



### Arta Muzeo ĉe la Maro

Molo Sud  
63074 San Benedetto del Tronto  
E-mail: piernicola.cocchiaro@gmail.com  
[www.comunesbt.it](http://www.comunesbt.it)  
[www.museodelmaresbt.it](http://www.museodelmaresbt.it)  
[www.mamsbt.it](http://www.mamsbt.it)

### Historia Arkivo

+39 735 585352  
[archivistorico@museisbt.it](mailto:archivistorico@museisbt.it)

### Kultura Oficejo

+39 735 794588/595 - Fax +39 735 794598  
[cultura@comunesbt.it](mailto:cultura@comunesbt.it) - [musei@comunesbt.it](mailto:musei@comunesbt.it)

### Turisma Oficejo

[turismo@comunesbt.it](mailto:turismo@comunesbt.it)

Pro helpo kaj kunlaboro, la organizantoj de la  
66-a Internacia Kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj  
estas dankaj al:

Regiono *Marche*

Provinco *Ascoli Piceno*

Komunumo *San Benedetto del Tronto*

Muzeoj *San Benedetto del Tronto*

Historia Arkivo *San Benedetto del Tronto*

Komerca Konfederacio (*Confcommercio*) *San Benedetto del Tronto*

Hotelo *Calabresi San Benedetto del Tronto*

Centro I.A.T. *San Benedetto del Tronto*

DLF (Postlabora Fervoja Organizo) *San Benedetto del Tronto*

# suda moleo



Gvidlibreto pri la Mara Arta Muzeo  
kaj pri la aliaj verkoj en la urba centro



Tiuj malgrandaj sed ĝojigaj koncentraĵoj de la urba memoro, kiuj estas la "Kajeroj de la historia urbo", riĉiĝis per nova ĉapitro. Post la vojaĝo al la ĉarmaj ĉambroj de Palazzo Piacentini en "hejme ĉe Bice", post la irvojo laŭ la spuroj de niaj maristoj per "havena vidaĵo", la fokuso de la laboro zorgata de nia arkivisto Giuseppe Merlini celas la arton "en plena aero", laŭ tiu skulpteja - muzea pado, kiu ekiras de la urba centro por alveni al la vasta maro laŭ la suda brako de la havena baseno.

Se la antaŭaj eldonaĵoj intencis montri arkitekturajn detalojn, atestojn, rakontojn de la pasinteco, la aktuala verko estas centrata sur la arta urbo desegnita en la lastaj jaroj, laŭ la preskribo de projekto, kiu prenis formon en la 90-aj jaroj, kies realiĝo certe ne alvenis al la fino.

Nur de malpli ol dudek jaroj, fakte, ekestis la ideo asigni al la urba centro, transformita, centrata sur la akso de Avenuo Secondo Moretti, la valoron de subĉiela artgalerio, kiu laŭgrade estis riĉigita per la verkoj de iuj inter la plej gravaj nuntempaj artistoj.

Tiel, datiĝas de la sama periodo la intuicio de arkitekto Piernicola Cocchiario kaj de ĝia asocio "La AltrArte", transformi la anoniman vicin de blokoj el travertino, metitaj por la projekto de la suda enŝipiĝejo en la haveno, en virgan spacon donitan ĉiujare al la krea genio de iuj el la plej talentaj skulptistoj en la mondo.

Tiel, la nuntempa urbo daŭrigas la atenton pri beleco kaj arto, kiu inspiris niajn samurbanojn de la pasintaj jarcentoj: feliĉe San Benedetto del Tronto neniam forgesis, ke la arto estas integra parto de la civilizo en ĉiu epoko kaj ke ĝi pozitive influas la kvaliton de la komunumvivo.

Tio estas sindevigo, kiun, malgraŭ la nuntempaj malfacilaĵoj, ni ne intencas rezigni.

*La Skabeno pri Kulturo*  
Margherita Sorge


*La Urbestro*  
Giovanni Gaspari


-o-o-o-

Tiu ĉi kajereto, eldonita okaze de la 66-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervoja Esperanto-Federacio), organizita de IFEA (Itala Fervoja Esperanto-Asocio), estis adaptita el samnoma eldono, zorge de Giuseppe Merlini, kun testoj de Piernicola Cocchiario, Giuseppe Merlini, Stefano Novelli, Benedetta Trevisani, fotoj de Alessandra Brancaccio, Piernicola Cocchiario, Maurizio Gabrielli, Fabrizio Mariani, Andrea Moro, Stefano Novelli, Quinto Oddi, Franco Tozzi, Eldonejo Fast Edit, Novembro 2013.

Tradukis kaj editoris ĝin, propraincitate, ame kaj danke pro la kortuŝa gastameco de la Urbo San Benedetto, Romano Bolognesi, Honora Prezidanto de IFEF, kiu kore gratulas al la aŭtoro kun la kunagantoj kaj dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis por la bona sukceso de tiu ĉi iniciativo kaj kunlaboris en la tuta manifestacio.

Bologna, Majo 2014.






Por la verkoj, markitaj per asterisko (\*), la artisto Teodosio Campanelli reproduktis la verkojn mem lilipute, tuŝuze de la blinduloj.

# suda moleo



## Arta Muzeo ĉe la Maro

Se la norda moleo estas la koro de la loka fiŝkaptada aktiveco, la suda moleo estas vera arta muzeo etendiĝanta tra la Adriatika Maro. Ĝi estas la vojo al la libereco, al kio estas materio kaj al kio estas naturo; ĝi estas la promenejo dediĉita al distriĝo, al kontemplado, al admirado pri kio estis farita de la suno, de la maro, de la homo kaj de la arto.



## Suda Moleo

La suda moleo de la haveno de San Benedetto del Tronto ĉiam estis konsiderata kiel promenajn kajojn, ideala etendo en la maron de urbaj areoj.

La konstrulaboroj de la unua sekcio de la kajo, hodiaŭ apenaŭ rekoneblaj ĉar preskaŭ tute enterigitaj, kiuj pli aŭ malpli korespondas al la parto de la perpendikulara vojo, kiu startas de la Blua Palaceto - de la monumento *Labori, labori, labori, mi preferas la voĉon de la maro* de Ugo Nespoli, la monumento al la Fiŝisto de Cleto Capponi - komencis en 1919, rompante la tipan linearecon de la marbordo de ĉi tiu parto de la Adriatika maro.

La unua plilongigo je 642 m okazis dum la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento; temas pri la sekcio inter la monumento al la *Fiŝisto* ĝis la monumento al *Mevo Jonathan Livingston*.

Post la 2-a mondmilito, kaj post komenca periodo de analizo kaj restaŭrado de damaĝoj en la urbo kaj aparte en la haveno, je la fino de la 40-aj jaroj komencis la laboroj por la konstruo kaj pligrandigo de la tria brako de la suda enŝipiĝejo, tio estas la parto, kiu ko-

mencas de la monumento al Mevo Jonathan Livingston, ĝis la monumento de la artisto Genti Tavanxhiu, dediĉita al Monsinjoro Sciocchetti.

La laboroj de pligrandigo de la suda enŝipiĝejo daŭris ĝis meze de la 50-aj jaroj per la konstruo de la kvara kaj lasta sekcio, kiu donis al la strukturo la finan formon, kun lasta interveno, inter la malfruaj 80-aj kaj fruaj 90-aj, kiam la lasta trajto estis plu etendita por permesi pli bonan protekton de la eniro al la haveno.

En 1986, danke al la iniciato de *Circolo dei Sambenedettesi*, kiu instaligis la monumenton dediĉita al Mevo Jonathan Livingston, la suda kajo estis renomita kiel "La Vojo al Jonathan."

Dek jarojn poste, en 1996, laŭlonge de la unua parto de la "Vojo al Jonathan", estis okazigita la unua eldono de la *Internacia Simpozio "Vivanta Skulptejo"* kaj tiu evento ŝanĝis ĝian estontan sorton, ĉar la promenejo komencis alpreni pli kaj pli la trajtojn de vera subĉiela artejo.

La "Artgalerio de la Suda Moleo: *Kolekto de travertinaj verkoj realigitaj dum la fojoj de la Internacia Simpozio Vivanta Skulptejo*"



La dua, negle instalita, reprezentas la arbon de la vivo, kun patrino vizaĝo, al kiu aliro ĉiĝas multaj malgrandaj infanoj, suĉantaj vivnutraĵon el la sinjoj.

Malsupre, la frazo "La ofero de la martiroj estingiĝas la soifon de la popolo." La verko estis produktita per la helpo de *Rotary Club* kune kun *Cassa di Risparmio* de Ascoli Piceno.

## Aliaj monumentoj

Tuj post la fervoja ponto, antaŭ la trafikcirklo kun la fama monumenta fontano, eminenta projekto de inĝ. Luigi Onorati, suden, estas monumento al "Infanteriano", de Amleto Cataldi inaŭgurita la 14-an de Aŭgusto 1921, kaj norden estas la "monumentoj al la libereco" de la loka skulptisto Marcello Sgattoni. Tiuj du monumentoj, kiuj estas lo-

kitaj en malsamaj epokoj, simbolas la sopiron al libereco, kiu inspiris multajn junulojn, kiuj batalis kaj donis siajn vivojn dum la Liberiga Milito por konstrui Italion libera kaj demokratia.

La unuaplana verko konsistas el malglata travertina bloko gravurita per la frazo "Al la mortintoj por la libereco", el kiu disradias pluraj ĉenoj, kiuj ligas al la planko flugantajn kolombojn.



Vale kaj Tino

estas la dua nomo donita de la Urba Estraro en 2009 al la vojo al Jonathan.

Anstataŭe datiĝas de Junio 2012 la lasta kaj fina nomumo de la promenejo: MAM, Mara Arta Muzeo de San Benedetto del Tronto, por reliefigi ĝiajn du unikecojn, nome esti, kun siaj skulptaĵoj, al kiuj aldoniĝis ankaŭ pentraĵoj, unu el la plej gravaj permanentaj subĉielaj muzeoj kaj la unika etendiĝo en la mondo laŭ pli ol unu kilometro en alta maro.

## La radiko de la moleo

Ĉe la punkto kie la suda avena brako, ĝuste fronte de la Blua Palaceto - iam favorata monduma renkontejo dum la someroj de San Benedetto kaj hodiaŭ strukturo uzata por kulturaj eventoj, en kies ĝardenon, krom la fera skulptaĵo "Papilio" de la artisto Giuseppe Marinucci, fine oni metis "Vale kaj Tino" e-ksterordinara bunta neona skulptaĵo de Marco Lodola, inaŭgurita en la Valentina tago en 2008 - estas la unua monumento de nuntempa arto aperinta en la urbo: "Labori, labori, labori, mi preferas la voĉon de la maro", de Ugo Nespolo, kiu fiere montriĝas de decem-

bro 1997. La verko estas el bunta ŝtalo pli ol sep metrojn alta, kiu reproponas kaj ripetas la titolan frazon kaj entenas profundan signifon.

La aŭtoro de la skulptaĵo koncipis la verkon parafrazante faman poemon de Dino Campana (1885-1932):

*"La laboro nobligas la homon, sed kiam la laboro iĝas laboro kaj laboro kaj laboro, la homo estas dispremita. Kaj ne ĉiam pro neceso, sed ofte pro avido, envio, deziro, pro falsaj necesoj, kiuj nin neglektigas la plej belajn donacojn, kiuj senkoste ĉirkaŭas nin. La maro, tiel, volas signifi ĉion, kio estas granda kaj sindona ĉirkaŭ ni kaj estas invito al ĉiuj ne forgesi la Diajn donacojn, kiuj estas proponitaj al ni je ĉiu momento."*

Daŭrigante orienten, sur malgranda teraso kun vido al la maro, staras impona monu-



Laboradi, laboradi, ...

mento al la **Fiŝisto** de artisto askolana, per adopto, sed naskiĝe el Grottammare, Cleto Capponi (1912-2000).

Ĝi estas verko dediĉita al kuraĝo, tenaceco kaj oferoj de la fiŝistoj de ĉiuj aĝoj, financita de la loka Popola Banko kaj inaŭgurita en la printempo de 1978 kaj reproduktas la veston de la fiŝistoj dum ŝtormoj, kiam, por atentigi pri la danĝero ekestanta de la nebulo minacanta super la maro, oni uzis la karakterizan "korno"-n farita el dika kaj specifa markonko.

El tiu monumento, daŭrigante laŭ la sekcio de la stato kun vido al la maro, oni alvenas al la vera suda moleo; promeni sur la kajo de la havena baseno estas vere kiel promeni en la libera maro.



La fiŝisto

Interalie, la suda kajo de San Benedetto del Tronto proponas ŝancon, kiun neniu alia havena brako havas, ĉar tie ĉi troviĝas MAM, Mara Arta Muzeo, unika pro sia beleco kaj medio, ĝuebla eĉ nokte danke al diskreta lumigado dum noktaj promenadoj.

*Fabrikadi fabrikadi fabrikadi*

*Fabrikadi fabrikadi fabrikadi*

*Mi preferas la voĉon de la maro*

*Kiu diras fabrikadon faradon kaj malfaradon*

*Faradi kaj malfaradi ĉiam estas daŭra laboro*

*Jen kion mi kapablas fari*

*Dino Campana*

## MAM Mara Arta Muzeo

MAM, Mara Arta Muzeo, malfermiĝis en Junio 2012; ĝi estas permanenta subĉiela muzeo, etendiĝanta laŭlonge de la tuta Suda Moleo de San Benedetto del Tronto sur unu mejlo, kaj jam estas hejmo de 145 artverkoj, el kiuj 135 estas skulptaĵoj kaj 10 pentraĵoj.

Krom 140 verkoj kreitaj dum la pasintaj dek sep fojoj de la *Internacia Simpozio "Vivanta Skulptejo"* de 130 artistoj el la tuta mondo, estas kvin aliaj skulptaĵoj de Mario Lupo, Genti Tavanxhiu, Giuseppe Straccia kaj Marcello Sgattoni.


## "Vidi tra ne signifas vidi enen"

"Vidi tra ne signifas vidi enen" aŭ "Rigardi tra ĝi ne estas kiel serĉi en ĝi," estas skulptaĵo inaŭgurita la 16-an de Julio 1998 samtempe kun la inaŭguro de la nova piediranta areo.

Ĝi estas verko de la usonano Mark Kostabi, kaj ĝi estis la unua lokita sur la avenuo kaj ĝi montras humanoidon kun fenestro malfermita sur la koro.

Ĝi estas la simbolo de la homaro, kiu minacas la sankciadon, la anonimecon, sed kiu, malgraŭ ĉio, ne rezignas pri sia ne ripetbla unikeco.

Tiel la homa estaĵo malfermas sian koron al la mondo, invitas la najbaron rigardi en la profundon de la animo de ĉiuj, dum la branĉo kun folioj en la mano estas la simbolo de la vivo, de la espero, kiu neniam mortas.



## "La saluto de Ubu"



Enrico Baj estas unu el la plej grandaj artistoj de nia tempo kaj li subskribis tiun ĉi verkon, kiu situas en Placeto *Pietro Micca* kaj kiu estis inaŭgurita en Novembro 2001. La verko estas el bronzo kaj memorigas pri teatraĵo de Alfred Jarry, la fondinto de Patafiziko.

La mesaĝo de Baj estas simpla: Ubu, ficcia persono, estas granda ludilo por ĉiuj. Ĝia ĉeesto volas transdoni iom da ĝojo al la "salono" de la urbo per sia buntaj ŝtonoj, siaj bronzaĵ buntaj floroj, siaj mekanikaj partoj, kiuj memorigas nazon, buŝon, okulojn. El sia loko ĝi bonvenigas ĉiujn turistojn kaj loĝantojn; ĝi estas tie por proponi bonvenigan signon, kaj, kial ne, inspiron por ĉies fantazioj kaj imagopovoj.



### Alfabeta listo de la artistoj, kiuj verkis ĉe MAM

Emil ADAMEC (Cina)	(Grecia)	Agnessa ivanova PETROVA (Bulgaria)
Ulrike AHEME (Germania)	Valentino GIAMPAOLI (Italia)	Fabrice PIEROT (Belgio)
Nobushige AKYIAMA (Giappone)	Giuliano GIUSSANI (Italia)	Sandro PIEMARINI (Italia)
Guillaume ALBY (Francia)	Dominika GRIESGRABER (Polonia)	Silvano PIZZA (Italia)
Filomena ALMEIDA (Portogallo)	Cristian HADINGER (Austria)	Jorg PLICKAT (Germania)
Vittorio AMADIO (Italia)	Toshihiro HASEGAWA (Giappone)	Cinzia PORCHEDDU (Italia)
Joao ANTERO (Portogallo)	Barbro HEDSTROEM (Svezia)	Sandra PORFIDIA (Italia)
Ugo ANTINORI (Italia)	David HENSEL (Inghilterra)	Nicolae RAZVAN MINCU (Romania)
Naomi ARROCHA REYES (Spagna)	Nami HSHIDA (Giappone)	Nadia ROGNONI (Italia)
Miho BANAC-MIJAC (Croazia)	Mitsunori OHAMA (Giappone)	Jorge ROMEO (Argentina)
Orazio BARBAGALLO (Italia)	Kim HWAI-KYUNG (Corea)	Jonas ROMERO ROMERO (Spagna)
Simone BECK (Italia)	Oriana IMPEI (Italia)	Beata ROSTAS (Ungheria)
Blanka BERNASCONI (Italia)	Norbert JAEGER (Germania)	PIRO' (Italia)
Francesca BIANCONI (Italia)	Halinka JAKUBOWSKA (Polonia)	Emanuele RUBINI (Italia)
Isa BOURLAND (Francia)	Elisabeth JUAN (Austria)	Luis Ramos RUBIO (Spagna)
Mario BORGNA (Italia)	Kristina KANAAN (Italia)	Ana RUIZ AGUI (Spagna)
Federico BROOK (Argentina)	Choi KEUM-HWA (Corea)	Silvia SALGADO (Colombia)
Sestilio BURATTINI (Italia)	Evrim KILIC (Turchia)	Park Eun SANG (Corea)
Fernando CACIORGNA (Italia)	Marisa KORZENIECKI (Italia)	Francesco SANTORI (Italia)
Emanuela CAMUCCI (Italia)	Petra LANGE (Germania)	Elena SARACINO (Italia)
Julia Donata CARRARÒ (Italia)	Michael LEVCHENKO (Ucraina)	Paolo SIGHINOLFI (Italia)
Regis CHAPERON (Francia)	Pasquale LIBERATORE (Italia)	Marcello SGATTONI (Italia)
Santo CICONTE (Italia)	Yann LIEBARD (Francia)	Yum SI-KWAN (Corea)
Giovanni COLONNELLA (Italia)	Mario LUPO (Italia)	Bruno SODINI (Italia)
Anne CORNIL (Belgio)	Pietro MAIOZZI (Italia)	Jun-ichiro SUGIMOTO (Giappone)
Umberto CORSUCCI (Italia)	Roberto MANSANO (Spagna)	Giuseppe STRACCIA (Italia)
Gianantonio CRISTALLI (Italia)	Marisa MARCONI (Italia)	Emidio STURBA (Italia)
Leonardo CUMBO (Italia)	Claudio MICHETTI (Italia)	Kamen TANEV (Bulgaria)
Davide D'ANGELO (Italia)	Marisa MICOZZI (Italia)	Genti TAVANXHIU (Albania)
Franco DAGA (Italia-Australia)	Toshihiko MINAMOTO (Giappone)	Yuri TKACHENCO (Russia)
DALEAST (Cina)	Gualtiero MOCENNI (Italia)	Maurizio TOCCACELI (Italia)
Francesco DE ANGELIS (Italia)	Mr. WANY (Italia)	Vladimir TOPI (Albania)
Simona DE LORENZO (Italia)	Danijela MRSULJIA (Montenegro)	Carmen TORNABUONI (Italia)
Domenico DI GUGLIELMO (Canada)	Michiko NAKAMICHI (Giappone)	Paolo TOSTI (Italia)
Marino DI PROSPERO (Italia)	Luc NAVET (Belgio)	Carole TURNER (Stati Uniti)
Luciano DIONISI (Italia)	Yoshin OGATA (Giappone)	Katharina WACKERMANN (Germania)
Pier Augusto DONATI (Italia)	Stefania PALUMBO (Italia)	Balk WUN JAI (Corea)
Mimo EIDMAN (Argentina)	Francesco PANCERI (Italia)	Jan VAN DE POL (Olanda)
ETHOS (Brasile)	Alice PASQUINI (Italia)	Karin VAN OMMEREN (Nuova Zelanda)
FABRICIANO (Argentina)	Susanne PAUCKER (Germania)	Renate VERBRUGGE (Olanda)
FAITH47 (Sud Africa)	Masa PAUNOVIC (Serbia)	Claudio PERRI (Italia)
Franca FRITTELLI (Italia)	Claudio PERRI (Italia)	Maurizio PERRON (Italia)
Anat GALANDSKI (Israele)	Maurizio PERRON (Italia)	Gabriele PERUGINI (Italia)
James GANNON (Irlanda)	Gabriele PERUGINI (Italia)	
Piero GENISINI (Italia)		
Dionisis GERALYMATOS (Grecia)		



## "La elefanteto inter la palmoj"

Temas pri gaja elefanteto kun orumita bronza palmo. Ĝi estas verko konceptita de Salvo (Salvatore Mangione) en 1999 kaj lokita ĉe la enirejo de Strato *Montebello*.

Ĝi estas unu el la vivantaj monumentoj de la urbo en la senco, ke de la momento de sia instalado ĝi fariĝis ludkunulo de ĉiuj infanoj, kiuj konkurencas por grimpi sur ĝian dorson.

## "Princo"

La skulptaĵo, kiu estas fakte fontano farita el multkolora mozaiko kaj muldita bronzaĵo, estas verko de la artisto Paolo Consorti. Ĝi estis lokita en la somero de 2000 ĉe la komenco de Strato Cairoli (kruce kun Avenuo Secondo Moretti).

La figuro de la "princo" regas la tutan strukturon, rompante la spacon per dinamika gesto. Temas pri granda knabo kun serpento.

La du figuroj sin tuŝas nur je unu punkto, kie la infana piedo premas la kapon de la besto.

La mozaiko de la baseno kaj la haŭto de la serpento estis riĉvalore laboritaj kaj la malluma patino de la bronzo, la figuro de la infano, per speciala traktado de la surfaco, estas brile smeraldverda.







## "Gajulo"

Verko de la artisto Ugo Nespolo el Torino, kiu inaŭguriĝis en Aŭgusto 1999 en la ĉeesto de belaj knabinoj en laŭuniformaj kostumoj, kiuj partoprenis en la antaŭ-finaloj de la nacia konkurso de *Miss Italio*.

Ĝi estas fontano kun multaj koloroj, kiuj reflektiĝas sur la akvo en ludo de senfina ĝojo.

Esence ĝi konsistas el granda okulo, kiu elmontriĝas el la interplekta strukturo, el stelo kiu brilas ĉe la kontraŭa flanko, el amuza fiŝeto kaj, ĉefe, el granda, kurbiĝanta, senhonta lango kiu supreniras sur la supron de la verko. Profundan sencon de ĝojo vi sentas admirante la fontanon, kies originala nomo, elkreita el la menso de la artisto, devintus esti "mokgrimaco".

## “La Retfaristino”

*Apenaŭ eklumiĝas je l' montetoj  
unue stornelas la retfaristino,  
plenigas ŝi per ŝnuro la langeton  
nodigante la maŝojn por la maro.*

*Giovanni Vespasiani*



## *"Monumento al Jonathan Livingstone" Mario Lupo, Italio, 1986*

*La artisto intencis dediĉi  
sian verkon al Mevo  
Jonathan Livingstone,  
ĉefrolanto en la romano  
de Richard Bach kaj  
simbolo de libereco.  
La skulptaĵo estas alta ĉirkaŭ  
8 m kaj estis realigita en 1986  
danke al la iniciato de la  
Circolo dei Sambenedettesi.*

**"Madono sur la rifoj" Giuseppe Straccia, Italia, 2012**

*La Madono reprezentas ĉiujn virinojn el San Benedetto, kiuj restis atendantaj sur la rifoj siajn familianojn, kiuj sur siaj fiŝbarkoj revenis el la maro.*



## "La songantoj"

La skulptaĵo de la samurbano Paŭlo An nibali, kun 4 m da alto kaj 2 m da diametro, estis modelita el argilo kaj bronze muldita fare de la sama artisto. Lumigita el interne, ĝi inkludas, krom la granda arbo, proksimume 30 figurojn.

Tiu verko volas konkretigi la esperon, kiun ni ĉiuj portas interne por pli bona vivo, por la savo, kiu ampleksas la naturon kaj la teron.

La vivo estas malfacila; niaj vivoj plenaj de atendoj kaj projektoj, dum la tempo fleksiĝas, arkiĝas sub la pezo de elreviĝoj, suferoj, doloroj. Ŝajnas ke fronte al ni restas nur la mallumo de la malespero, la mallumo de la morto. Sed estas ĝuste en tiu dezerto, ke ĉio rekomencas.

Jen, do, la simbolo de la malnova, kliniĝanta, mortinta arbo, jam nun malstabila, kiu minacas treni kun si la sorton de ni ĉiuj, sed kiu ankoraŭ obstine proponas ŝirmejon por ĉiuj vivantaj estaĵoj: homoj, bestoj, insektoj trovintaj en ĝi siajn nestojn.

Je krepusko, bonŝance, ĉiuj ekdormiĝas kaj, unuope, ili komencas sonĝi pri la renaskiĝo de sia vivo, de la maljuna trunko, de la tuta naturo. Do, en la sonĝo, novaj esperoj reviviĝas kaj la ciklo de la tero magie rekomencas sian vojiron.

## "La Retfaristino"

Pensita kaj realigita de *Inner Wheel - Rotary Club* en la urbo kaj inaŭgurita en 1991, la monumento al la Retfaristino, bronza verko de la skulptisto Aldo Sergiacomi el Offida (1912-1994), estas laŭdeva omaĝo al unu el la tipaj figuroj de la urbo, al tiu, kiu senlace, faras kaj riparas la ĉefajn laborilojn de la fiŝkaptistoj, ĝuste la retojn.

Al ĉi tiu tipa virina profesio, kiu nun jam malaperinta, oni ŝuldas grandan kontribuon por la evoluo de la fiŝkaptado, kiu ja kunigas la historion, la kulturon kaj la gravajn ekonomiajn fortojn, sur kiuj, preskaŭ ekskluzive, San Benedetto del Tronto longtempe sin regis.

Frazo eltirita el nacilingva poemo de Giovanni Vespasiani, ĝuste dediĉita al la retfaristino, riĉigas la marmoran bazon de la verko.



## SUBĈIELA ARTA GALERIO EN AVENUEO SECONDO MORETTI

Jam en 1882, kiam finfine oni plialtigis la nivelon de la pavimo de *Placo de Armiloj* (nun *Placo Giacomo Matteotti*), de *Avenueo de la ankrigo* (nun *Avenueo S. Moretti*) kaj de la tuta "Mara" kvartalo, oni komprenis la gravecon, kiun havus la ĉefa vojo kondukanta al la marbordo. En 1901 ĉi tiu centra urba avenueo estis nomita laŭ la urbestro *Secondo Moretti* kaj hodiaŭ, por elvoki la malnovajn "ankrigojn", oni starigis grandan ankron ĉe la stratkomenco.


*Avenueo Secondo Moretti*, sekve de la interveno de rekvalifikado ankaŭ en *Strato Montebello*, estas la vera centro de la urbo, la monduma salono de la urbo, riĉigita per kelkaj skulptaĵoj kaj artverkoj, vera subĉiela galerio, kiu karakterizas tiun "Insulon de la arto."


Komencante el *Placo Matteotti*, post la historia fontano tie relokitita en 1984 iniciate de *Circolo dei Sambenedettesi*, kaj daŭrigante orienten laŭ *Avenueo Secondo Moretti*, vi renkontos la jenajn verkojn:



### "Monumento al Monsinoro Sciocchetti" Genti Tavanzhiu, Albanio, 2006

*La monumento al monsinjoro Sciocchetti montras velbarkon kun motoro ĉe la fina parto. Ĝi volas omaĝi al tiu, kiu donis impulson al motorizado de la fiŝbarkoj.*






**“Inkubacio” Toshiiko Minamoto, Japanio, 2005**


*La artisto volas esprimi la ideon, kiu estis ankaŭ de Michelangelo, pri la skulptartaĵo jam vivas en la ŝtono.*


*La skulptaĵo estas nomata de la muzeaj vizitantoj “la sonorilo”, pro la fakto ke batante ĝin per manplato ĝi eligas sonon iel simila al tiu de sonorilo.*




**“Kulpaj pro peko neniam farita” Mr. Wany, Italio, 2013**

*Diras la aŭtoro: “Temas pri denuncdeklaro kontraŭ la antaŭjuĝoj pri la virina figuro dum la historio kaj laŭ la popola percepto, la origina peko.*






VIVANTA PENTREJO




**“La kanto de la marvirino”  
Franco Daga,  
Italio - Aŭstralio, 2011**

*La skulptisto volis realigi figuron de marvirino, lia preferata temo, kiu el la maro, per dinamika elano, atingas la muzean promenejon kvazaŭ por saluti la vizitantojn. En 2011 Vivanta Skulpejo estis dediĉita al la Adriatika Maro. Partoprenis artistoj el ĉiuj regionoj kaj nacioj, kiuj alrigardas ĝin.*



*Ĝi estas tributo al ĉiuj virinoj”.  
La artisto, kiu estas, en Eŭropo, unu el la plej konataj italaj stratpentristoj,  
pentris la virinon fermita en tri apartaj spacoj kaj realigis la verkon dum  
nur unu tago.*



**“Ni savu la balenojn”  
Giuseppe Straccia,  
Italia, 2011**

*Per sia verko la artisto intencis lanĉi kroman mesaĝon cele al protekto de la mara medio kaj kontraŭ la estingado de balenoj. Straccia, loka kaj aŭtodiakta naiva artisto, inspiriĝis al Pinokjo de Collodi.*



**“Sen titolo” Daleast, Ĉinio, 2013**

*La murpentraĵo, kiu montras anason, kiel ĉiuj murpentraĵoj de Daleast, intencas esti denunco por la savado de la medio kaj de la animaloj, kiuj vivas en ĝi.*



## "La maro, la reveno"

Alia verko, kiu esprimas la valorojn de la maristaro el San Benedetto, reliefigante la historian signifon estas la monumento titolita "La maro, la reveno", inaŭgurita la 10-an de Marto 2001 je la kajo "Malfizia" antaŭ la detala fiŝmerkato.

La verko, kreita de la samurbano Paŭlo Annibali, gajnis la konkurson organizita de *Circolo dei Sambenedettesi* kun la apogo de la Urbo por krei lokon de preĝo kaj rememoro honore al ĉiuj, kiuj perdis sian vivon en la maro.



La strukturo, farita el travertino, konsistas el duoncirkla bazo, sur kiu staras kvin kolumnoj subtenantaj samtiomajn bronzaĵojn reprezentantaj eventojn pri la vivo de la maristoj, eterne hezitantaj inter la bezono marŝipiri kaj la emociaj ligoj kun la familio.

Ĝi estas ĥora prezentado de la historio de ĉi tiu urbo, granda atesto pri la loka kulturo konfidita al la arto per eksterordinara intenseco, kiu esprimas la esperon, la angoron, la atendadon, kiun travivis (kaj ankoraŭ travivas en multaj kazoj) ĉiuj, kiuj el la maro eltiras la vivrimedojn por si kaj por la familianoj.

*la reveno*





la azenon, por igi ĝin pli realan "subakva kri-  
po."

Tio montras esperon, por ke, jaron post jaro, a-  
liaj artistoj povu labori kune por skulpti la a-  
liajn personojn de la naskiĝa sceno, cele krei i-  
tineron, kiu, el la subakva naskiĝgrupo, povu a-  
tingi la supron de la rokoj.




La maro,



**“Aŭskultante la maron” Su-  
sanne Paucker, Germanio,  
2013**

*La skulptaĵo celas esti invito  
de la aŭtorino “halti de tempo  
al tempo por aŭskulti tiun ĉi  
voĉon de la naturo, kiu memo-  
rigas al ni, ke la homo estas  
nur parto de ĝi”. La skulptaĵo  
estas unu el la plenformaj ver-  
koj plej grandaj de la muzeo,  
inter tiuj realigitaj dum Vi-  
vanta Skulptejo.*



*La ĉefa karakterizaĵo de la verkoj de Daleast estas, ke ili aperas kiel skulptaĵoj  
realigitaj per maldikaj feraj fadenoj kaj la vizitantoj de la muzeo restas tre surpriz-  
itaj kiam, alproksimiĝante, komprenas, ke la verko estas nur pentraĵo.*

## Vivanta Skulptejo

Ekde 1996, laŭ ĉirkaŭ 500 m, la unua parto de la promenejo estas riĉigata per artaĵoj danke al la unika kaj speciala ekspozicio "Vivanta Skulptejo".

Ĝi okazas en la monato de Junio de ĉiu jaro kaj dum semajno la naciaj kaj internaciaj artistoj inviti-taj partopreni, realigas siajn verkojn ĉe la viciĝintaj ondrompilaj blokoj de la suda moleo de San Bene-



La fontano (detalo)

detto del Tronto, sub la ravita rigardo de la publiko, kiu, escepte, povas vidi la artiston dum la laboro liberigi formon, kiu estas fermita en la bloko, alporti ĝin al la vivo, doni al ĝi dinamismon.

Kompare kun la artaĵoj entenataj en la muzeoj aŭ en aliaj fermitaj lokoj, tiuj ĉi verkoj estas vivantaj, ĉar ili ekzistas en unika medio, kies fono estas la maro, kun tuta sia poezio kaj forto, kun la ankritaj aŭ moviĝantaj fiŝbarkoj kaj kun la flugado de la mevoj.

Transformi unu el la plej sugestaj kaj vizitataj lokoj de la havena baseno en permanenta arta ekspozicio, estis unu el la plej bonaj intuicioj, kiun la urbo elektis en la lastaj jaroj.

La *Internacia Simpozio* "Vivanta Skulptejo", ekde ĝia komenco, estis efektivigita ĉiujare nome de la urbo San Benedetto del Tronto kaj de la arta kaj kultura Asocio "L'altrArte", kiu ankoraŭ nun prizorgas la artan direktadon kaj organizadon.

En la unua parto de ĉi tiu longa kajo estas ankaŭ la originala fontano el betono kaj riverŝtonetoj, konstruita en 2010, nome de la Urbo San Benedetto del Tronto, de la loka skulptisto Marcello Sgattoni.

Jam je la 16-a jarevento, tiu de 2012, danke al la grava kunlaboro kun la Fondaĵo *Cassa di Risparmio* de Ascoli Piceno, por la unua fojo la *Simpozio* estis plibonigita per nova sekcio en la kvara kajoparto (je proksimume 400 m), dediĉita al la murpentraĵoj, kiu vidis kvin famaj italaj kaj eksterlandaj murpentristoj, realigi la unuajn kvin superbajn murpentraĵojn, ĉiuj vastaj po 12 m<sup>2</sup>.

kaj ekonomie pro siaj multaj sukcesoj, kiu neklarigeble kaj bedaŭrinde estis fonto de multaj babiladoj kaj senvaloraj konjektoj. Lia figuro kaj lia "misio" absolute filantropiaj estis iel rekonataj kaj rehabilitataj de San Benedetto en 1946.

Li mortis la 3-an de Majo 1946 en San Francisco.

La verko, preskaŭ 8 m alta, kies la stilizado montras velŝipon, ekipita per turbino, entute farita el blanka travertino el Ascoli, kiu nokte, konvene lumigita, aspektas kiel grandega alabastra flugilo.



... kaj dumtage

## “Madono de la maro”, "subakva kripo" kaj "bareliefo de nia Sinjorino de la maro"

Ankaŭ interesa estas la monumenta grupo el travertino, kreita de la skulptisto Giuseppe Straccia, konsistanta el "Madono de la Maro" lokita sur la rokoj fronte al bareliefo, ĉiam dediĉita al "Nia Sinjorino de la maro" lokita ĉe la akvosurfaco, en honoro de ĉiuj falintoj el la maro, kaj originala subakva "Naskiĝo de Jesuo", tamen, videbla en la maro.

La Naskiĝo de Jesuo, aŭ la Sankta Familio - stariĝanta en ia subakva kaverno ĉirkaŭita de roka duoncirklo realigita sur la ekstera flanko de la 2-a brako de la suda enŝipiĝejo - estas videbla en la maro, kiam ĝi estas trankvila, eĉ de la molea stratnivelo sen neceso de subakviĝo.

Per la iniciato de la Submara Amatara Grupo de la Itala Ŝipa Ligo de San Benedetto del Tronto - kiu en la jaro 2010 komisiis al la artisto Giuseppe Straccia la realigon de la "Naskiĝo de Jesuo" kiel protekto de ĉiuj subakvuloj - konkretiĝis la ideo realigi subakvan artgalerion, kiu integrus kaj kompletigus la aktualan laŭ la promenejo de la suda moleo.

En la somero de la jaro 2013 al la "Naskiĝo de Jesuo", denove al la manoj de la artisto Straccia, estis aldonmetitaj ankaŭ la bovon kaj





*Monumento al Monsinjoro Francesco Sciocchetti nokte ...*

## Monumento al Monsinjoro Francesco Sciocchetti

Ne malpli impresa estas la monumenta verko en travertino efektivigita en 2006 de la albana Genti Tavanxhiu je iniciato de *Lions Club* de San Benedetto del Tronto *Host* en la 30-a datreveno de la naskiĝo de la sekcio kaj estas dediĉita al Monsinjoro Francesco Sciocchetti (1863-1946).

"La parokestro de la fiŝistoj", kiel li mem menciis sin dum nacia kongreso pri fiŝkaptado. Ora medalo de la Ministerio de Publika Verkoj, li dediĉis sian vivon al la antaŭenigo de inĝenierio kaj al la progreso de la teknika fiŝkaptado kaj al la instruado de la fiŝistoj en speciala lernejo por motoristoj.

Li intense zorge agadis en paŝtista kaj paroka agado, en la establado de laboratorio por ku-

drado kaj brodado de la knabinoj, en la stariĝo de "kursoj" instruantaj la junulojn al la mara vivo, kaj li firme volis kompletigi la laborojn de la nova preĝejo "*Madonna della Marineria*." Tiel la maristaro multe ŝuldas al li.

Post la fondo de la "Societo Anonima Kooperativo fiŝkaptado", en Majo 1912, danke al li, estis lanĉita en la maron "*San Marco*", la unuan fiŝtransportan boaton, el la tutlanda duoninsulo) kun helpa motoro, kiu havis la taskon kolekti sur la alta maro la fiŝojn de la fiŝkaptaj ŝipoj kaj alporti ilin al la tero certigante la fiŝfreŝecon de la kaptitaĵoj kaj sen devigo por la ŝipanoj plenumi la saman operacion en la danĝeroj ekestantaj de veterkondiĉoj.

En la 20-aj jaroj de la XX jc. Don Francesco Sciocchetti elmigris al *San Francisco* (Kalifornio), jam eluzita emocie, psikologie



*Artistoj dum verkado*





## Monumento al Mevo Jonathan Livingston

Laŭlonge de la promenejo de la suda moleo vi povas admiri la majestan monumenton al Mevo Jonathan Livingston. Ĝi estas verko de la artisto Mario Lupo (1926-1992), forte apogita en majo 1986 de *Circolo dei Sambenedettesi* kaj starigita ĉe la unua kubuto de la kajo.

La monumento, tute el bronzo, kiu estas projektita al la blua ĉielo por ĉirkaŭ 8 m en alteco, estas konsiderata la simbolo de la persistemo kaj laboremo de la maristoj de San Benedetto del Tronto, de tiuj homoj kiuj senĉese strebas al la plej bono por si kaj por sia urbo, kapablaj alfronti kaj digne superi ĉiujn obstaklojn.

Fakte ĝia plej profunda signifo kuŝas aliloke: en la maltrankvila klimato pro la ŝanĝoj dum la 70-aj kaj 80-ja jaroj, *Circolo dei Sambenedettesi* deziris sendi pozitivan mesaĝon al la

urbo, turmentata de la okazaĵoj pro disvastigantaj junularaj problemoj.

Ĝi estas invito flugi pli altan por rigardi pli malproksimen, por gajni la liberecon de koro kaj spirito, per la individuaj klopodoj intence al altaj celoj, eskapante la logikon de la grupo, kiu iafoje povas subfosi la aŭtonomion de la penso kaj sklavigi pro materiaj bezonoj.

Tiel en la Klubo naskiĝis la ideo, kiu baldaŭ fariĝis arta projekto, trovante en *Mevo Jonathan Livingston*, la ĉefrolulo de la romano de Richard Bach, modelon por esti proponita. Aŭ pli bone simbolon reprezentanta en artaj formoj la sopiron al la libereco, kiu precipe devas animi la junulojn.

La verko estis konfidita al la artisto Mario Lupo, kiu en la laborejo de la fratoj Sciarra realigis kion ekde ĝia unua apero estis takсата kiel "Monumento al ĉielo kaj vento."

La Mevo Jonathan, kunfandita laŭ la tekniko "disperdita vakso", havas enverguron je 1,80 metroj.

La grupo de la mevoj ĉe la bazo de la verko, ankaŭ ili el bronzo, konsistas el 10 - 12 elementoj, kun disvolviĝo en alteco de 3 m kaj larĝeco je proksimume 2 m.

La ŝtala ringego, fiksita sur bazo el betono, havas diametron je 6 m.

La urbanaro, rekte implikita en la prezento de la projekto ĉe la Konsilia Kunveno (Aprilo 1984) kaj poste per lerneja konkurso por la studentoj de San Benedetto (Junio

1985), respondis per entuziasma partopreno, kiu konkrete montriĝis per grandega amaso en la inaŭgura tago.

Tio okazis la 25-an de Majo 1986.

Hodiaŭ la monumento restas magneto por ĉiuj, civitanoj kaj turistoj, kiuj daŭrigas vidi en ĝia invito aeran malpezecon por liberigi la menson de la katenoj de la ĉiutagaj malebligoj, tiel ke ĝi povu flugi kiel mevo tra la bluo de la maro kaj de la ĉielo.

